

## Diru tridek tri

[el la Itala Esperanto-Federacio revuo "L'esperanto"]

de Renato Corsetti

### 2) Ĉu vi parolas arabe?

Ĉu vi parolas arabe? Tion oni retorike demandas, por reale diri: "Kial vi parolas tiel nekompreneble?!" Mi dirus, ke se esperantistoj (inkluzive de italaj esperantistoj) parolus la araban, ili povus paroli Esperanton pli bone. Kial? Ĉar la araba estas lingvo, kiu funkcias kiel Esperanto: estas radikoj kaj estas aliaj elementoj, kiuj modifas la radikon. Ni faru malgrandan ekzemplon: KTB estas la radiko por "skrib-", kaj el tio oni formas KaTaBa = li skribis, jaKTubu = li skribas, KaTiB = skribisto, verkisto, KiTaB = libro, maKTaBa = biblioteko.

Ĉu tio ne memorigas vin pri la serio: san-, malsan-, malsanul-, malsanulej- de niaj bonaj lernolibroj?

Tute prave niaj bonaj (ekzistas ankaŭ la malbonaj) lernolibroj memorigas pri tio, ĉar Zamenhof volis fari ĝuste ion tian. Eble lia kono de la hebrea (kiu funkcias kiel la araba) helpis lin. Eble nur lia intuicio sufiĉis.

Aŭskultu lin:

"Mi aranĝis plenan dismembriĝon de la ideoj en memstarajn vortojn... Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alikonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la lingvoj eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne traleginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona), - li eĉ ne supozas, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo." [Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto, 1929 - 12-a eldono, Parizo: Esperantista Centra Librejo, paĝo 248-a.]

Verŝajne la antaŭparoloj de la lernolibroj malmulte atentigas lastatempe pri tio, kaj multaj tre aktive provas kaŝi tion, por ke Esperanto perdu ĉi tiun aspekton tute fremdan por la eŭropaj popoloj. Ĉu ni ne volas ke Esperanto estu lingvo de Eŭropo, en ĉiuj sencoj.

Nur tiel oni povas klarigi la amason da novaj radikoj por aĵoj kaj aferoj klare indikitaj en Esperanto per kunmetitaj radikoj. Ĉi foje mi volas atentigi nur pri du kazoj:

- "literatoro", kies senco klare estas "literatur-ist-o" paradas sur la paĝoj de "La gefianĉoj", kaj kaŭzas spasmojn eĉ al la ostoj de la "nenomito", kiu intertempe fariĝis bona kristano kaj sekve ankaŭ pia kaj bona esperantisto. Bonvolu ne diri al mi, ke jam Zamenhof eksperimente uzis tiun vorton, ke Kabe opiniis, ke..., kaj ke Waringhien multe ŝatis ĝin. Zamenhof mem klare diras en la Fundamento, ke "... ĉio, kio estas kontraŭ ĉi tiu libro [la Fundamento] devas esti rigardata kiel malbona, eĉ se ĝi apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem." Eĉ PIV mem (elstara

vortaro de la okcidenta dialekto de Esperanto) listigas ĝin kaj resendas al "literaturisto".

- "malsanulejo", la vorto, kiu ĉef-rolas en ĉiuj informiloj pri la riĉeco de la vort-konstrua sistemo de Esperanto. Serĉu ĝin (vane) en la vortaro itala-esperanta de Carlo Minnaja, je la kap-vorto "ospedale". Neniu komento necesas.

Multaj aliaj ekzemploj ekzistas de vortoj kreitaj de homoj, kiuj ne komprenis, ke Zamenhof "...aranĝis plenan dismembriĝon de la ideoj en memstarajn vortojn..." nek parolas la araban. Vidu ilin en la konstruata paĝaro:

[http://www.bonalingvo.it/index.php/Simplaj\\_samsignifaj\\_vortoj](http://www.bonalingvo.it/index.php/Simplaj_samsignifaj_vortoj)